

# ESPERO KATOLIKA

REVUO MONATA

AVIZO GRAVA. — Tiu ĉi n-o de E. K. aperas tre malfrue, tial ke la Direktoro, ne estante certa, se li povus alesti la Kongreson, ne volis paroli pri kunveno speciala por la Katolikaj Esperantistoj antaŭ ol scii se tiu kunveno estus ebla. Dank'al la malavareco de Societano de E. K., kiu ne volas koniĝi, la afero estas nun decidata. — La n-o 20-a de E. K. aperos nur post la Kongreso, por doni novaĵojn pri ĝi al la legantoj, kiuj ne povos veni Boulogne'on.

## NIAJ AFEROJ

La legantoj de E. K. formas familion, kies ĉia membro devas interesiĝi pri la familiaj aferoj, t. e. pri la progresado aŭ neprogresado de la Societo kaj de la Revuo E. K.

Ni devas do *nepre* utiligi la Kongreson de Boulogne por havi specialan Kunvenon kaj por interparoli pri niaj propraj aferoj. Jen kion mi proponas

1-e. La dimankon 6-an de Aŭgusto, je la 11 h. 1/2, en la Preĝejo *Saint-Nicolas*,<sup>1</sup> kiu estas tre centra, (Placo Dalton), — *meso speciala*, al kiu estas invitataj ĉiuj la Kongresanoj, eĉ nekatolikaj, Dum tiu meso kantoj diversaj en Esperanto kaj predikadeto en Esperanto, de la Direktoro de E. K.

2-e. La mardon 8-an de Aŭgusto, je la 4-a horo, en la lernejo *Saint-Stanislas*, strato Victor Hugo, 25, (ne malproksime de l'Preĝejo *Saint-Nicolas*) fariĝos Kunveno speciala por la Esperantistoj katolikaj. Jen la aferoj pritraktotaj en la Kunveno

a). Raporteto pri la nuna stato de nia afero.

b). Propono de fondo de Internacia Societo de Katolika Literatura

La Direktoro de E. K. klarigos la motivojn de tiu dezirinda fondo kaj la rimedojn efektiviĝi ĝin (Akcia Societo; pligravigo de la revuo E. K.)

Niaj samreligianoj, kiuj alestos la Kongreson, *estas trege petataj* partopreni tiun Kunvenon, *kio tre gracoj por la estonteco de Espero Katolika*. La nealestantoj estas petataj sendi skribe sian opinion al la Direktoro' de E. K.

Kartoj Kunvenaj estos aĉeteblaj en Boulogne je la porto de Kongresejo kaj ĉe la Paroĥestro de Saint-Nicolas. Prezo 1 franko.

LA DIREKTORO DE E. K.

1. Ni volas publike danki la Paroĥestron de St-Nicolas, Kanonikon Joncquel, kiu tre afable akceptis, ke ni solenigu nian meson en sia Preĝejo.

HIMNO <sup>1</sup>

(Dediĉita al l'Esperantista Kongresanaro en Boulogne-s-Mer, Franci.)

El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj  
Ni kunvenintaj Vin adoras Di'!  
Al vi sin turnas niaj piaj sentoj,  
Kaj nia kanto sonas nur al Vi!

Vi — nia patro, ni ja — viajidoj  
Kaj reciproke — fratoj al ni mem!  
Venu do amo, estu for dividoj!  
Venu frateco kaj pereu prem'!

Per la donita al ni krea forto,  
Via, Kreinto, estas ni imag'  
Vi kreis tutan mondon per la Vorto,  
Ni vin imitas per la vort'kaj ag'.

De ni kreitaj estas art', scienco,  
Nun celas mondon ni de ideal';  
Tre malfacila estis krekomenco,  
Hodiaŭ kreas ni en granda skal',

Laŭ via diro ekposedu teron!  
Ni ĝin okupis kaj posedas nun;  
Transnaĝas marojn, sondas atmosferon  
Kaj ĉie loĝas kie brilas sun'.

Al ni obeas fortoj de naturo,  
Al ni jam servas elektrec', vapor';  
Nur peka sekvo de Babela turo  
Nin malhelpadis en nia labor'!

(Originale verkita de Prof. A. Dombrovski, el S. Peterburgo)

Sed jen eĉ tiu baro forigita  
Homon kompreni povas ĉiu homo;  
Ĉar estas lingva komprenil' kreita  
Kaj ĉie sonas ĝia bela nom'

Ĝin al Vi, Dio, ni kun preĝ'oferas.  
Volu el alta beni ĝin ĉiel'!  
Kun ĝia helpo baldaŭ, ni esperas,  
Plej sankta estos atingita cel'

Sub la konduko civilizacia.  
Kuniĝos granda de nacioj ar';  
Kaj — antaŭsigno de la regno Dia, —  
Aperos unu jam ĉiuhomar'.

Kaj ĝi ne estos plu estaĵo muta.  
Ĉar propran lingvon havos kun konsci';  
Kaj tiun voĉon de homaro tuta  
Atentas reĝoj kaj ĉiunaci'...

Ho, venu tiu hor' de unueco!  
Rompon, dividon amas nur Satan'...  
Patro ni preĝas vin pri la frateco  
Nian laboron benu via : man'!

## RIMARKINDAJ PAROLOJ DE GOETHE

Laŭ ĝenerala juĝo, la germana poeto Gœthe ne estis tre kredula koncerne religiaj dogmoj. Li estis protestanto; sed tamen ni trovas en liaj verkoj parolojn, kiuj almenaŭ elmontras, ke li ĉiam respektis la religion kaj neniam atakis iun pro lia kredo. Oni scias ke li tute alie juĝis la konvertiĝon de grafo Stolberg, kiu fariĝis katoliko, ol la ceteraj iamaj amikoj de tiu grafo. La plej rimarkinda juĝo de Gœthe pri katolika institucio tamen estas tiu, kiun mi sciigos; ĝi des pli estas rimarkinda, ĉar, kiel jam dirite, li estis protestanto.

1. Tiu himno estos kantata dum la moso, kiu estas solenigata por la Esperantistoj en Boulogne.

La unua filo de Joanno Henriko Voss (tradukinto de Homer'a *Iliado* kaj *Odiseo*). Henriko Voss, rakontas en sia verko *Goethe kaj Schiller laŭ leteroj* jenan okazintaĵon

La 2-an de-februaro 1805 li havis belan interparoladon kun Voss pri la utilo kaj malutilo de la Reformado kaj la preferindaĵoj de la katolika kaj protestanta religioj. « Mi tute pravigis lin, diras Voss, ĉar li kulpigis la protestantan religion pro tio, ke ĝi tro multe ŝargis la konsciencan de ĉia individuo. Jam estinte, ia konsciencna ŝarĝo povis esti forigita de la konscienco per alia persono, sed nun ĉiu ŝargita konscienco devas portadi la ŝarĝon per si mem, kaj per tio perdas la potencon reharmoniiĝi kun si mem! — Ke do neniam, Goethe diris, oni estu foriginta de homo la konfeson per orelo! — Voss aldonas al tiu diraĵo jenajn vortojn « Per tio Goethe elparolis bonegan diron! En precize tiu momento mi komprenis tiun veron; ĉar mi mem troviĝis en tia kazo! Kiam dum pasinta somero, ĉio kuniĝis por igi min lasi Vejmaron por translokiĝi Vicburgon, mi ne povis trovi konsolon dum mi restadis en mia ĉambro. Sed ĉiufoje, kiam mi alvenis al Goethe kaj « elverŝis mian tutan koron » antaŭ li (eĉ ĉiujn la malfortecojn de mia interneco!) kiel antaŭ konfesprenanto, mi kiel refortigita per nova kuraĝo revenis al mia soleco, kaj pro tio mi dankos lin dum tuta vivado mia! Mi devas diri, ke dum tiuj tagoj Goethe kvazaŭ denove kreis min! Li tiun ĉi kaj tiun malfortecon sciigis pri mi, ĉar mi tute ne volis kaŝi ion de li, kaj mia sincereco nepre bedaŭrigis min poste eĉ dum unu momento. Mi proprege povas diri, ke Goethe indulgis ĉiujn miajn pekojn, aŭ mi indulgis ilin mem, konigante ilin al li; kaj sen tiu faro mi certe estus konsumiĝinta min mem! Ho! ke do multe da tiaj konfesprenantoj estu en mondo! Tiam pli malmulte da ĉagrenitaj koroj ekzistus vivantaj! »

Goethe estis igita paroli pri tio, ĉar Voss estis alportinta al li la « Manĝotablajn Paroladojn » de Luther. Estas de interese ekkoni, ke post la antaŭe dirita interparolado, Goethe, — laŭ la diro de Voss — igis la verkon de Luther esti « forĵetata tra la pordon! »

Mi pensas, ke oni juĝos pri la diro de Voss des pli ĝuste, ĉar oni memoros, ke Voss, kiel Goethe, ankaŭ estis — protestanto!

Sciigite de L. E. MEIER, el MUNĤENO.

## KRISTANA VENĜO

Supre, sur la monteto, estas kastelo kaj, malsupre, sur l'ebenigo, dometo.

Tio ĉi malamas TION.....

Kaj malamego de l'aristokrata domo por la popolamasula loĝejo tiel plifortiĝis ke, je la lastaj elektoj, la grafo de Fierly, — tiu de supre, — venkita de Rougeard, lia eksfarm-mastro, — tiu de malsupre, — diris, pri sia feliĉa venkinto

— Estas sentaŭgulo, kiun mi vi petos la proksiman fojon kiam mi lin renkontos !

Je kio la Socialisto, celanta al la monteto per sia premata pugno, respondis simple

— Ke li tien venu !

Tien veni ?... granda Dio ! Pri tio oni ne pensas plu, supre, en tiu-ĉi momento. Ne estas plu la malamikeco ; estas granda konfuzo, kiu reĝas en la kastelo de gesinjoroj de Fierly. Ĉie, sur ĉiu etaĝo, oni aŭdas l'ekbatajn akrajn kaj skuatajn de sonoriletoj, oni mallonge ordonas : « Ne, ne ! ne tio, tio ĉi ! » oni aŭdas sufokajn ekkriojn kiuj teruriĝas por ĉiu loĝanto : « Ho ! Dio mia !... Dio mia !... » Kaj ankaŭ maltrankviligataj vizaĝoj, kiuj post la lumigitaj fenestroj kuras tien-ĉi kaj tien, rapidaj, kaj palaj pro teruro.. Ĉielo, kio do estas ?

Nu ! estas ke tiun-ĉi matenon, je la sepa horo, kiam la juna kastelmastrino venis por ricevi la gajan « Bonan tagon, patrineto ! » de sia filo, ŝi ekaŭdis ke la voĉo de sia knabeto fariĝas tute raŭka ; la karaj braketoj, kiuj ĉirkaŭprenas ŝian kulon, brulas kiel fajro. Maltrankviligita ŝi pretendis esplori la gorgon, kaj en ĝi... ho ! teruro !... ŝi ekvidis ĉi-tiun blankan punkton kiu... « Ha ! rapide ! rapide ! Ke oni jungu la ĉevalojn !.. Kuracisto ! kuracisto !

— Doktoro, vi lin resanigos, ĉu ne ?

Parolanta tiujn-ĉi vortojn la juna virino, ĉi-tio diveniĝas, detenassin por ne sin ĵeti antaŭ la genuojn de tiu-ĉi homo, kiu sola, post Dio, posedas la kapablon ŝin esperigi.

Kaj la kuracisto, kvankam supersatigita de multaj malĝojoj similaj, kiujn li de tridek jaroj vidas, per voĉo ekstremetanta respondas

Jes, Sinjorino... Plej bone estos se prosperos al sinjoro Grafo ricevi tubeton kaj ĝustatempe reveturi tien-ĉi !

— Se... ! Se... ! mallaŭtas la grafino skuanta malgaje la kapon kaj al el elefantosto farita kristo rigardanta per siaj okuloj plenaj je larmoj ; « ĉar neniadube ĝi estas la krupo, la malbelega krupo kiu, simila al funebra akcipitro premas la gorgon de la tiel amata knabo. La membrano esplorita per mikroskopo malkaŝis sian teruran sekreton ; estas tie, ĉi-tiu mortiga mikrobo de la difterio, kiu nekalkuleble multiĝas, tiu-ĉi por infanoj mortiganto, kiun franca scienculo fine...

— Se l, Doktoro, diris subite la grafo de Fierly, ĉu oni ne ĵus elpensis, en Parizo, novan kuracilon ?

— Jes, via grafa Moŝto, la seromterapio... Malfeliĉe estas tre malfacile ricevi tubeton da ĝi, instituto Pasteur ne povas plenumi ĉiun deziron ; mi skribis mem multfoje, sed vane !

— Malgraŭ tio, ekkriis tiam la Grafo, mi havas en Parizo potenciajn, konatojn ; kaj eĉ se mi devus maltrankviligi ĉielon kaj teron, mi venkos ĉiujn malfacilaĵojn kaj ricevos tubeton !

Post mallonga tempo li foriris...

Fine, je la unua horo de la postagmezo, la atendata telegramo alvenis

*Dank' al Dio, post multe da klopodoj, tubeto ricevata. Mi nepre trafas vagonaron, reeniros je la kvara horo. Avertu Doktoron.*

Nun, la grafino de Fierly ne estas plu sola. Apud ŝi — anĝelo brilanta de ĉielo sendita por kompati al korenuantaj animoj, kiuj lin alvokas — estas l'espero !...

*Sekvo venos*

JEAN DES TOURELLES <sup>1</sup>. (El france tradukis A. DENONCIN.)

(Reeldono malpermesata)

## KATOLIKAJ PAĜOJ

R. P. Ludoviko el Granado estis sendube la princo de la eklovento hispana. Neniu uzis la lingvon pli pure, ritmapompe, fluide, elegante kaj diverstone ol li, servigante ĝin por altaj ideoj kaj piaj elmontroj de korsentoj. (15 4-1588).

Ja mi nescias kial plaĉas al ni plimulte la krutaj vojoj de l'malvirtoj ol la plataj de la virtoj. En la humileco oni trovas la ripozon, la trankvilecon kaj la pacon. Tial ke ĝi estas esence paca kaj plata, kvankam blovas kontraŭ ĝi la ventoj kaj la ondegoj de la mondo, ili ne trovas kie rompi la forton de siaj furiozaj puŝoj. Dolĉe sur la sablo, platigis tiuj grandaj ondoj maraj kiuj bruegantaj frapas kontraŭ la altaj ŝtonegoj. Kio ajn alvenas al la humilulo, ĉar li ne ĝin kontraŭstaras, sed flankigante malaltigas sian kapon, li nenion baras, kaj preterpasigas tion. Ĉiu braveco de la maro okazas kontraŭ la altaĵoj kaj ŝtonegoj kaj senfuriozigas sur la dolĉaj plataĵoj kaj molaj sabloj. En la altaj montoj perfortas la ventoj, kiuj ne blovas en la malaltaj kaj humilaj valoj. La vojoj de la malhumiluloj estas malebenaj, tre kavhavantaj kaj ŝtonplenaj, ĉar kie estas la malhumileco tie estas la indignado, tie la sovaĝeco, tie la maltrankvilo kaj la ĝeno por ke eĉ tie ĉi suferu la malhumilulo tiun justan kondamnon, kaj tiel ekkomencu por la malbonulo lia infero, kiel la anino de la bonulo havas jam la principon de sia gloro, en la trankvilo de sia konscienco.

(El la religia predikado pri la Epifanio. Esperantigita de R. CODORNIU).

## AMIKO BONA

La doloro estas servanto, kiu tempo post tempore venas por demandi, ĉu ni havas ion por peti de ĝi koncerne nian vivon spiritan. Ni devas respondi jes, venu kaj helpu min kontraŭstari egoismon, avarecon, mondamon ; helpu min ekzerciĝi en pacienco, en tolerado, en humileco, en kredo, en egaliĝo de l'amata Majstro, kiu estis homo de doloro, — por ke mi estu kun li en feliĉego.

Ĉar se ni mortos kun li, ni kun li vivos ; se ni kun li suferos, ni kun li regos. Tio tamen ne tiele, ke la doloro per si mem estas bono ĉio dependas de tio, kiel ni ĝin portas. Ni do portu ĝin kiel Kristo

<sup>1</sup>. Vidu en E. K., n-o 13-a, p. 21-a, sciigojn pri Jean des Tourelles.

ĝin portis. Aliparte, la doloro certe por ni kiel por li estas tento ; kaj se ĝi estas tento, estas eble ke ni falos en la tentado. Tial ni ne devas serĉi la doloron ; sed kiam ĝi venos, — kaj ĝi certe ne mankos, — ni devos vidi en ĝi servanton, kiu estas sendata de nia Patro ĉiela por helpi nin en nia sanktiĝado kaj pliboniĝo.

(El Sveda verko de PONTUS VICNER tradukis H. K.)

## OPINIOJ DE SANKTA AUGUSTINO KAJ PLINIO PRI LINGVO INTERNACIA

Antaŭ ĉio la malsimileco de l'lingvoj homon faras fremda de homo. Ĉar se du el ili renkontiĝas, kaj, pro ia necesajo, devas ne disiĝi, sed kune restadi, unu nesciante la lingvon de l'alia, — pli facile senvoĉaj bestoj, eĉ diversaspecaj, unuiĝas, ol ili kvankam homoj ambaŭ ! Kiam do ili, nur pro diverseco de lingvoj ne povas interkomuniki iliajn pensojn, tiam granda simileco de naturo estas senutila por societiĝo ; en tia kondiĉo, homo pli volonte kun sia hundo vivas, ol kun fremdulo...

(Tiu teksto troviĝas en la verko de S-a Aŭgustino *De civitate Dei* Libro XIX, ĉap. VII).

« Tiom da naciaj idiomoj estas, tiom da lingvoj, kaj tiel granda diverseco de lingvaĵoj, ke fremdulo preskaŭ ne estas homo por alinaciano. »

(El Plinio naturisto, *Historia naturalis*. Lib. VII. ĉap. I.

*Tradukoj de PAUL TENNESON, el PARIZO.*

## LERTA RESPONDO

Edzino, kies edzo mortis pro malfeliĉa, fervoja okazintaĵo, ricevis de la respondeca societo DEK MIL FRANKOJN.

Post iom da tempo, ŝi ekkonis, ke voĵaganto kiu perdis nur kruron, ricevis DUDEK MIL FRANKOJN.

La juna vidvino surmetis sian ĉapelon kaj sian ŝalon kaj tuj iris al l'oficejo de la nomita societo.

— Kial ! vi pagis DUDEK MIL FRANKOJN por kruro, kiam vi donis al mi nur DEK MIL pro la morto de mia edzo ?

Oni respondis al ŝi :

— Sinjorino, la kaŭzo estas simpla : kun DUDEK MIL FRANKOJ la suferanto ne povas havi alian kruron ; sed, kun DEK MIL FRANKOJ, se vi volos vi havi alian edzon !

*Esperantigis A. FRÈRE.*

## NOTETOJ

**Grand Dictionnaire Français-Esperanto** (Granda Vortaro franca-esperanta). Ni signalas al niaj legantoj tiun gravegan libron, pri kiu oni trovos detalojn en aparta *aldono*. Tiuj, kiuj volas verki aŭ traduki Esperante nepre bezonas tiun Vortaron, la plej plenan el tiuj ĝisnune publikigitaj.

**Trala Mondo** esta nova gazeto internacia ilustrata, Ĝi ne estos *lingva* sed parolos pri ĉiuspecaj aferoj nuntempaj. Ĝia kosto esto nur 7 fr.50 (7 fr. en Franc.) Oni petu specimenon (po 60 centimoj) al l'Administranto, 15 boulevard des 2 gares, Meudon (S.-et-O.) Franc. Plej koran bonvenon al nia nova kunfrato !

**Esperantaj ŝlosiloj** (de S-o E. Ĉefeĉ, 45, Christchurch Rd., Streatham, London S. W.). Ni ricevis novan eldonon de la *angla* « ŝlosilo ». La malbona elparolo de « eŭ » estis forĵetita, sed... oni neniel klarigis la manieron elparoli ĝin. — La *franca* « ŝlosilo » estas nun aĉetebla, kaj ni tre konsilas, ke oni uzadu tiun mirindan propagandilon. Troviĝas ankoraŭ kelkaj preseraroj en tiu ĉi eldono la sufikso « ig » estas forgesita en la vortareto; *koni* signifas france *connaitre* kaj ne *reconnaitre* (rekoni); *tiu* signifas *celui-là, celle-là*, kaj plie *ce, cet, cette*. Post la vorto « ĉi », en la vortareto, oni diras, ke *tiu* signifas *que*, ki<sup>o</sup> estas eraro. Oni tute silentis pri la elparolo de la diftongoj « eŭ », « aŭ ». Tio estas bedaŭrinda.

**Kongresaj Projektoj** broŝuro 32-paĝa, enhavanta la diversajn projektojn ĝisnun sendatajn al la Grupo de Bo logne. Aĉetebla po 25 centimoj. Tiu libreto estas *necesa*, ne nur al la Kongresanoj, sed ankaŭ al tiuj, kiuj volos bone kompreni la diskutojn, kiuj fariĝos dum la Kongreso.

**Sicilia Federacio Esperanta** esperas, ke multaj Esperantistoj abonos la revuon *Sicilia Universitaria*, kiu eldoniĝos duone en Esperanto *se Esperantistaj legantoj estas sufiĉe multaj*. Skribu al D-ro Vitangelo Nalli, Corso Calatafimi 495, Palermo, Itallando. Abono 6 fr. 50.

**Semajno Sociala** en Orléans (Loiret) Franc. — Dum tuta semajno de la 31-a de julio ĝis la 5-a de Aŭgusto, la plej famaj kaj kleraj *katolikoj socialaj* faros paroladojn en Orléans, pri diversaj temoj koncerne la vivado sociala. Sin turni por karto kaj klarigoj al S-o Franz Serrier, 30 rue Xentrailles, Orléans.

## SĀKLECIONOJ POR LERNANTOJ

de la Ŝakredaktoro J. L. S., ĉe la Direktoro de E. K.

### LECIONO II. — IRMANIERO DE LA PECOJ

Du pecoj neniam staras sur unu Kv. Nenia peco, krom Ĉ, povas transenpasi Kv-on okupatan de alia peco.

REGO iras rektlinie, antaŭen, malantaŭen, flanken aŭ diagonalen, sed nur unu paŝon.

DAMO iras same, kiel REGO, sed ne nur unu paŝon : se la tabulo estus malplena, D staranta sur unu el la 4 centraj Kv-oj povus iri al iu el 27 Kv-oj.

TURO iras rektlinie al ia Kv en la sama linio aŭ vico kie ĝi staras mem ; t. e. iras antaŭen, malantaŭen, flanken, sed ne diagonalen. Kie ajn ĝi staras ĝi povas, se la tabulo estas malplena, iri al iu el 14 Kv-oj.

KURIERO povas iri nur laŭ la diagonalo sur kiu ĝi staras. Sur centra Kv., ĝi povas iri al iu el 13 Kv-oj ; en angulo, ĝi havas la elekton el nur 7. Kuriero sur blanka Kv. ĉe la komenco ĉiam restas sur blanka Kv. — Vi vidas ke la irmanieroj de T kaj K kune faras la irmanieron de la D.

ĈEVALO iras iom strange unu Kv-on same kiel iras T-o, kaj poste unu K-on same kiel iras K-o. Tiuj du moviĝoj faras unu ĉevalan iron. Per aliaj vortoj, Ĉ iras al la plejapuda malsamkolora Kv., kiu ne estas sur la sama linio, vico aŭ diagonalo, sur kiu ĝi mem staras antaŭ ol moviĝi. — Sur centra Kv., ĝi povas iri al iu el 8 Kv-oj ; en angulo ; nur al iu el 2. — Ĉ ne estas malhelpata transiri, se pecoj staras sur la apudaj Kv-oj.

R, D, T, K aŭ Ĉ regas ian Kv-on, kien ĝi povas iri ; atakas kontraŭan pecon starantan sur tiu Kv. ; povas kapti pecon atakatan de si. Sed R ne povas esti kaptata. Kiam vi kaptas pecon per R, D, T, K aŭ Ĉ, vi formovas la *kaptaton* de la tabulo, kaj metas la *kaptantan* pecon sur la Kv. mem, kie staris la *kaptato*.

(*Sekvo venos*).

### LUDO III. — KR Ludkomenco

(Korespondada ludo el *British Chess Magazine*)

Blanko : S<sup>o</sup> Gimmer ; Nigro S<sup>o</sup> Padfield

1. S — 4 R	1. S — 4 R
2. K — 4 K	2. Ĉ — 3 KR
3. S = 3 D	3. K — 4 K.
4. Ĉ — 3 KD	4. S — 3 D
5. S — 4 K	5. Ĉ — 5 Ĉ
(3... S × S, aŭ K × Ĉ estus plibone).	6. Ĉ — 7 KR
6. S — 3 ĈR	7. S — 3 ĈR
7. D — 5 T	8. Ĉ × T
8. D — 6 T	9. K × Ĉ
9. S — 5 K	

Blanko	Nigro
10. K — 5 Ĉ R	10. S — 3 KR
11. D — 7 Ĉ	11. T — 1 K
12. Ĉ — 5 D	12. Ĉ — 2 D
Se 12... D — 2 D ; 13, Ĉ × S K ŝak, T × Ĉ ; 14, D × T, kaj N ne povas eviti tujan mortigon aŭ perdon de D.	
13 SK × S	13. Cedas
Se 13... S × S : 14, D × S ŝak, T — 2 K ; 15, Ĉ × S ŝak, D × Ĉ 16, K × D, Ĉ × K ; 17. D × T ŝak, kaj gajnos.	

NOVAĴOJ. Marshall, la amerika probatalanto, venkis Janowski (Francujo) gajnante 8 ludojn, dum Janowski gajnis 5. Entute ili ludis 17 ludojn. Marshall ludos kontraŭ Lasker por decidi kiu ricevos la titolon : Mondŝakmajstro.

Napier, la juna angl-amerika majstro, estis venkata de Teichmann, german-anglano. Ili ludis 11 ludojn.

En Wien'o 72 ludoj estis ludataj por provi la Reĝallogajan ludkomencan rifuzitan. Blanko gajnis precize tiel ofte, kiel Nigro. Tie ankaŭ Schlechter gajnis la unuan premion da 700 kronoj ĉe la Wien'a ŝakklubo.